KOMUNIKOJ
TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 44-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2020 N-ro 179

"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
Jesuo (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
Zamenhof. *La Espero*.

# RADIKOJ

Aymoré Vaz Pinto

RIGARDANTE LA EKZEMPLON de la arbojn i povas fari plurajn konkludojn. La radikoj ne vantmontras sin. En la silento de la mallumeco ili preparas la nutran sukon, por ke la arboj montru florojn, donu fruktojn, ŝirmu birdojn kaj oferdonu ombrojn al la preterpasantoj.

Radiko estas ekzemplo de humileco, de silento. Se la Tero estus travidebla, ni vidus, eble, laŭ spegula vidado, ne sole la supran parton branĉoplenan, riĉegan, sed ankaŭ la radikojn, profundajn kaj ankaŭ branĉoriĉajn kiuj, krom nutri la arbon garantias ĝian ekvilibron dum la tempestoj.

Tiel estas la familio. Patro kaj patrino estas la radikoj, kiuj subtenas la branĉojn, donas ekvilibron en la espero de bonaj fruktoj en la oportuna tempo.


Ekzistas arboj, kiuj donas amarajn fruktojn, aŭ tiuj ne fruktodonantaj. Ekzistas ankaŭ familioj similaj al erikoj kun fruktoj de la maldanko.

Sed la bona ĝardenisto scias kultivi la ĝardenon kaj kun helpo de la tondo scias korekti la plantaĵojn.

Tiel ankaŭ devas la gepatroj apliki la tondon sur la malbonaj inklinoj, utiligante la ilojn de la pacienco kaj energio por la korektado de la kondukvojo de siaj gefiloj.



## *AMIKOJ DE LORENZ*



**Eurípedes Barbosa, aktiva brazila esperantisto kaj spiritisto, naskiĝis la 4-an de Septembro 1948. Li jam okupis diversajn postenojn en la esperantista movado, kaj verkis, kune kun Aymoré Vaz Pinto, du gravajn verkojn: "Neforgeseblaj Skribaĵoj de Ismael Gomes Braga" kaj "Ni lernu kun Porto Carreiro Neto", ambaŭ publikitaj de Brazila Esperanto-Ligo. Eurípedes estas konstanta kunlaboranto de nia Eldonejo, ne nur kiel ano, sed ankaŭ kiel verkisto por Almanako Lorenz kaj ankaŭ por nia trimonata bulteno Komunikoj. Eurípedes estas vera homarano kaj meritas niajn sincerajn dankojn pro lia bona semado.**

**Koran dankon, kara frato!**

**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

## LORENZ KAJ LA VIRTUALA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dankesprimoj

ASOCIO LORENZ varme gratulas al UEA pro ĝia pionira kaj sukcesa realigo de la virtuala kongreso. Ni kore kaj speciale esprimas nian dankon al Sara Spanó, al la Ĝenerala Sekretario de UEA, Aleks Kadar, al la vic-prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr, al Anna Lowenstein, kaj al la tre valora teknika asisto de E@I pere de Matthieu Desplantes kaj Sofia Zaretskaia. Ni ankaŭ dankas al ĉiuj geamikoj de nia asocio, kiuj honoris nin per sia partopreno en niaj eventoj, kaj al ĉiuj geamikoj, kiuj konstante kunlaboras kaj apogas nian asocion per pluraj manieroj.

Ni ankaŭ kore dankas al Affonso Soares, prezidanto de la Konsilantaro de Lorenz, João Silva dos Santos, Alvaro Motta kaj Anderson Delgado, kiuj disvolvis la temojn "Lorenz: 45 Jaroj!" kaj "Kunsido de la Amikoj de Lorenz".

Al vi ĉiuj, nian plej sinceran koran dankon!

La Estraro




LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 44-a – n-ro 179 | Julio-Aŭgusto-Septembro 2020

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: **+ 55-21-98485-4539**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**
Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br** | Fejsbuko: **Editora Lorenz**



Kompostita de Rogério Mota




I. Al Espero 11. (23.) IV. 1892

Tre estimata sinjoro! - Antaŭ semajno mi ricevis la ĝojigan telegramon pri la oficialiĝo de la societo "Espero". Kredeble la telegramo estis sendita de vi, kaj tial mi ankaŭ respondon sendis sub via adreso.  Mi sendas al vi mian koran dankon por la telegramo kaj mi atendas de tago al tago pli detalan leteron.

La oficialiĝo de la societo estas grava paŝo kaj mi kore gratulas vian societon por tiu ĉi sukceso. Mi esperas, ke nun la laborado de la Espero baldaŭ larĝe disvolviĝos kaj ke pli aŭ malpli frue la tuta centro de nia afero transportiĝos S. Peterburgon.

Mi petas vin enskribi min en la nombron de la membroj de via societo kun la pago de 10 rubloj ĉiujare. Tiun ĉi  monon mi petas vin preni el la enspezoj por la libroj, kiujn mi siatempe sendis al s-ro N. Halle. Mi petas vin sendi al mi ekzempleron de la statutoj kaj membran bileton.

Ĉu via klubo ne deziras presi en la "Esperantisto" inviton al niaj amikoj fariĝi membroj de via societo? En tia okazo mi petas vian klubon sendi al mi la tekston de tiu ĉi invito.

Mi ne scias, kiaj estas viaj planoj por la estonteco, sed mi pensas ke antaŭ ĉio vi devas per ĉiuj fortoj peni fondi solidan kason, ĉar por sukcesoj en nia afero, tiel same kiel por milito, "estas necesaj tri objektoj: mono, mono kaj mono".

Al vi kaj al ĉiuj estimataj membroj de la "Espero" koran saluton...

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895.  Eldonejo Ludovikito, 1989.)

# La Suno

Ĉiam ridetas la Suno
Malantaŭ la nuboj sensencaj...
Ĝi tamen ridetas plu,
Antaŭvidante la tempon, kiam
denove ĝi povos montriĝi kun
sia rideto.
Lindaj nuboj traflugantaj, vi
ne pasas sen nebuligi la bildon
de l´ lumplena ĉielo...
Lindaj iluzio-nuboj!
Iluzio, kiu kaŝas la ridetantan Sunon.
Aero kisata de l´Suna rideto,
Klopodu, ke l´nuboj forpasu rapide!
Vento, puŝu kun mildeco tiujn nubojn,
kiuj blokas la ĝojon de l´ Suno!
Ridetu por ĝuadi la rideton de la
Suno!
Ni komprenu, ke la nuboj ne forigas la
Sunon,
Sed nur kelkatempe kaŝas ĝin.
Kiom ajn densa aŭ longa ĝi estas,
Ĝi nepre pasas.
Estu kuraĝa kaj trankvila!
Dank´al Dio!

Spirito: Antônio Francisco
Mediumo: Manuel Francisco
El la portugala lingvo tradukis: Benedicto Silva
Kunlaboris: João Ângelo



## SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al

**editora_lorenz@uol.com.br**

# NECESA RENOVIĜO

"Ne estingu la Spiriton."
Paŭlo (I Tesalonikanoj, 5:19)

**KIAM LA APOSTOLO** al la nacianoj skribis ĉi admonon, li ne volis diri, ke la Spirito povas esti detruita, li ja provis renovigi la mensan sintenon de tiuj sufokantaj siajn noblan inklinojn.

Ne malofte ni rimarkas personojn, kiuj agas kontraŭ sia propra konscienco, por ne enklasiĝi kiel spiritaj homoj. Sed la enkarniĝintaj estuloj restas en laborplena lernado, por altiĝi en la mondo kiel gloraj spiritoj, kio estas la plej granda celo de la surtera lernejo.

La homoj tamen longe staras malproksime de la granda vero. Ili ordinare preferas la tradician konvenciismon kaj nur malfacile malfermas sian menson al la realaĵoj de la animo. La moroj efektive estas elementoj potencaj kaj decidaj en la evoluo, sed nur tiam, kiam ilin inspiras noblaj principoj.

Nepras do ne asfiksii la ĝermojn de la edifa vivo, kiuj ĉiutage naskiĝas en la koro sub la influo de la korfavora Patro.

Ekzistas fratoj, kiuj revenas el la Tero tra la sama pordo de nescio kaj indiferento, tra kiu ili eniris. Jen kial, ĉe la bilanco de la ĉiutaga agado, la disĉiploj devos demandi al si mem: "Kion mi faris hodiaŭ? Ĉu mi forte akcentis ta trajtojn de la malsupera homo, kia mi estis ĝis hieraŭ, aŭ ĉu mi disvolvis la noblajn spiritajn kvalitojn, kiujn mi deziras konservi morgaŭ?"

Fonto: XAVIER, Francisco Cândido. Pão nosso.
Spirito: Emmanuel.
Eldonejo FEB, 2016, cap. 135
Reformador n. 2282, p. 21

# SALUTE

Kaj nune, Zamenhof,
Ĉar forpasis jarcento
Jam, post alveno via
Al la mondo transiĝa,
Ni respekte salutas
Vian tutan gradecon.

Post via don' al homoj
De la luma mesaĝo:
- Esperanto sublima, -
Furiozaj militoj
Reskurĝis senkompate
Naciojn dividitajn.


Sed el la nokta fundo,
Kie malpaco svingas
Siajn mallumajn skurĝojn,
La stelo fulmobrila,
Kiun verda vi kreis,
Anoncas l' unuiĝon.

Kaj ni, Esperantistoj,
Ĉe labor', disigitaj
Sur la tuta Terglobo,
Kun vi rediras ja:
- Laŭdata estu Dio!
- Benata estu l' amo!..

Francisco Valdomiro Lorenz

(Mesaĝo psikografie ricevita de Francisco Cândido Xavier, la 19-an de Januaro 1959, en la urbo Uberaba, Minas Gerais, Brazilo.)

Fonto: Esperanto kiel Revelacio
Eldonejo Lorenz, 2015, p. 17-18



"El tiom da diversaj opinioj, la sola, kiu restas neskuebla, estas, ke estas pli bone ricevi ol fari maljustaĵojn, kaj ke antaŭ ĉiuj aferoj oni devas klopodi ne por ŝajni virta homo, sed esti virta homo."

(Interparolado de Sokrato en la malliberejo kun siaj disĉiploj)



# LAŬDO AL ENTERIGISTOJ

Célio Freitas Martins




**EN ĈIUJ PARTOJ DE LA MONDO** kaj ĉiuj epokoj de la homa historio, ĉiam ludis gravan rolon la enterigistoj, la tombistoj, kiel herooj, riskante siajn vivojn kaj sanon kaj de ties familianoj kaj amatoj. Nevidataj laboristoj, kiuj neniam laciĝas, kaj, kvankam ricevantaj malaltajn salajrojn, ne strikas...

Ili nur fosas la grundon kaj en ĝin metas, monotone kaj metode, la kadavrojn, milionojn da ili, bilionojn... Ĉu vi iam partoprenis entombigon de tombisto? Ĉu ili neniam mortas? Mistero... Ekde la komenco de la jaro 2020-a, ili laboradas ankoraŭ multe pli, la tutan tagon kaj kelkfoje eĉ nokte. Ordinare ili fosas denove la saman lokon, post kelkaj jaroj, por preni la ostajn restaĵojn, tiom karajn al la parencoj de l'΄mortinto. La parencoj pensas, ke la mortinto ankoraŭ "vivas" interne de tiuj ostaĵoj... Oni danku la tombistojn pro ties grava laboro! Oni almenaŭ rimarku, ke ili ekzistas! Oni valorigu ilian laboron! Oni preĝu, favore kaj fervore, por ilia sano kaj de ties familioj kaj amatoj. Dio fortikigu iliajn naturajn imunajn defendojn, tiel ke ili ne malsaniĝu kaj efike kontraŭstaru ĉiajn ajn malsanojn. Ili kaj iliaj familianoj kaj amatoj, havu vivon plenan je ĝojo kaj plenan je materiaj akiroj ankaŭ. Oni preĝu por ili, ĉar "iam" ni ankaŭ bezonos iliajn servojn.


# FRATECA PETO

Helpu per via preĝo ĉiujn viajn fratojn:
kiuj neniam trovas tempon aŭ rimedojn por esti utila al iu;
kiuj sin sentas ĉie vundataj de aliula maldankemo;
kiuj vindas al si la okulojn per nigra tolaĵo, por vidi malbonon en ĉiaj situacioj;
kiuj rigardadas mil kastelojn en la aero, sed ne
ekbruligas eĉ unu kandelon sur la tero;
kiuj nur laboras en la ebura turo de sia persona kulto,
ne malsuprenirante ĝiajn ŝtupojn por kunlabori kun la ceteraj;
kiuj sin kredas specialaj senditoj kaj kreditoroj je privilegioj;
kiuj konsumas altvaloran tempon de la aŭdantoj,
parolante ekskluzive pri si mem;
kiuj rezignas lernadi plu en la homa lukto;
kiuj gardadas pardonpeton por ĉiuj siaj kulpoj;
kiuj pretendas la rolon de korifeoj en la mondumo;
kiuj sin opinias nepraj centroj de la ĝenerala intereso;
kiuj sisteme kultas malsanon kaj malhelpadon kontraŭ ĉio.
Ili estas suferantoj de grava malsano, bezonantaj la Silentan Helpon.




Spirito: Andreo Ludoviko
Mediumo: Francisco Cândido Xavier
Libro: Kristana Agendo

# ALMANAKO LORENZ 2020




**FINFINE, JEN LA TRADICIA ALMANAKO LORENZ,** eldono 2020. Nia Jarlibro estas la unika en la esperantismo kaj pritraktas ĉiujn temojn, kiuj interesas la modernajn homojn laŭ la spirita vidpunkto, kaj ĝi ampleksas vastan kampon de la filozofio, scienco, informoj, transmondo, religio, kulturo ktp.

Eminentaj verkistoj el diversaj partoj de la mondo partoprenas Almanakon per neeldonitaj kronikoj: Probal Dasgupta, Renato Corsetti (intervjuo), Trevor Steele, Ulrich Lins, Vladimir kaj Anatolij Ionesov, Przemyslaw Grzybowski, José Passini, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia kaj diversaj aliaj kompetentaj samideanoj kunlaboras en nia Jarlibro.

Se vi, ekster Brazilo, senpage, volos ricevi la pdf-an aŭ paperan versiojn, skribu al ni: **editora_lorenz@uol.com.br**

## LA UNIVERSO KAJ DIO

Léon Denis

**SUPER LA PROBLEMOJ PRI LA VIVO** kaj la destino staras la demando pri Dio. Se ni studas la leĝojn de la Naturo, se ni esploras la idealan belecon, el kiu inspiriĝas ĉiuj artoj, ni nepre ĉie kaj ĉiam, super ĉio kaj en la fundo de ĉio trovas la ideon pri unu supera Estaĵo, necesa kaj perfekta, eterna fonto de l' Bono, de l' Belo kaj de l' Vero, en kiu identiĝas la Leĝo, la Justeco kaj la superega Racio.

La mondoj fizika kaj morala estas regataj de leĝoj, kaj tiuj leĝoj elmontras profundan scion pri la aferoj de ili regataj. Ili ne fontas el blinda kaŭzo: la ĥaoso kaj la hazardo ne kapablus krei la ordon kaj la harmonion. Ili ankaŭ ne havas homan devenon, ĉar tiaj nedaŭraj estaĵoj, limigitaj en la tempo kaj en la spaco, ne povus krei leĝojn konstantajn kaj universajn. Por ilin logike klarigi, estas necese sin turni al la Estaĵo generanta ĉiujn aferojn. Oni ne povus koncepti la intelekton, ne personigante ĝin en na estaĵo, sed ĉi tiu nepre ne enviciĝus en la ĉeno de la aliaj estaĵoj. Ĝi estas la Patro de ĉiuj kaj la origino mem de la vivo.

Fonto: Post la Morto: envolvo de la doktrino de la spiritoj.
Eldonejo Lorenz, 2016, p. 93




**Karaj geamikoj el la tuta mondo, se vi volos ricevi, senpage, pere de Interreto, pdf-ajn versiojn de Almanakoj Lorenz, sciigu al ni vian retadreson kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br**